

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio, pri la centjareco de Ruĝa Kruco. Vi aŭdas la naŭan prelegon pri tiu temo.

Henry Dunant ne bezonis multajn paĝojn en sia verko *Rememoro de Solferino* por alvoki la homojn kaj registarojn al fondo de societoj de volontuloj, kies tasko estus sukuri la viktimojn de militoj kaj de naturaj katastrofoj. En tiu alvoko li bone montras, ke Ruĝa Kruco ne estos rimedo por humanigi militojn, sed nur paliativo, kiu nur povos malgravigi kelkajn individuajn suferojn, ĝis la tago kiam la homoj forlasos la servuton de la perforto.

Henry Dunant, iniciante la fondon de Ruĝa Kruco, volis doni konkretan formon al la porpaca batalado, kiu ofte restas teoria kaj abstrakta. Ne ĉiuj tiamaj filantropoj apogis Henry Dunant. Ekzemple Florenca Nightingale, kiu famiĝis dum la krimea milito en 1854 pro sia heroa sukuro al la vunditoj kaj malsanuloj, ne estis favora al la projekto de Henry Dunant. Ŝi timis, ke movado kiel Ruĝa Kruco favoros la militemon de la ŝtatoj, ĉar ĝi riskas malpezigi ilian respondecon. Henry Dunant ankaŭ antaŭvidis tiun danĝeron. Pro tio li deziris la fondon de movado absolute sendependa de la nacioj, kiu ĵaluze konservu la statuton de privata filantropa societo. Li estis klarvidanto, kiu komprenis, ke la militoj ne estas facile forigeblaj, kaj ke, eĉ se ekzistas movado kiel Ruĝa Kruco, la militoj neniam humaniĝos, ĉar ili estas la neniigo de ĉia homeco. Henry Dunant vidas en la movado, kiun li proponas, ne nur sukursocieton. Li vidas en Ruĝa Kruco specon de lernejo, kie kuraĝaj homoj povos iom post iom disvastigi novan humanismon supernacian kaj vere universalan. Kiel li faris en Solferino, li scias, ke liaj posteuloj dum la venontaj konfliktoj ankaŭ aŭdigos la alvokon de tiuj, kiuj staras super la batalo.

Henry Dunant konsciis ekde Solferino, ke tiom longe, kiam inter antagonistoj ne ekstaros aro da porpacaj batalantoj, la homaro ne povos eliri la inferan rondon de la venĝemo. Por li la rolo de la pacbatalantoj estas rememorigi dum milittempo al la ŝtatoj iliajn subskribitajn internaciajn konvenciojn kaj devigi dum pactempo plibonigi tiujn konvenciojn por iom post iom enkonduki en la internaciajn kutimojn uzon de internacia juro. La rolo de tiuj pacbatalantoj ankaŭ estas resti neŭtralaj observantoj, kiujn venĝemo kaj naciismo ne blindigas. Ne estas facila rolo, sed grava rolo. Estas la sola vojo, por ke post konflikto la voĉo de la vero aŭdiĝu. Henry Dunant atendis de la delegitoj de Ruĝa Kruco duoblan rolon, tiun de flegistoj de vunditoj kaj samtempe tiun de veraj homaranoj, kiuj kuraĝas resti ideologie ekster konfliktoj.

La historio montris, ke oni forŝovis Henry Dunant de la laboro de Ruĝa Kruco ekde ĝia fondo. Oni provis kredigi, ke li estis revemulo, kiu ne havis siajn piedojn sur la tero. Malgraŭ tiu forŝoviĝo Henry Dunant tamen havis grandan influon sur la disvolviĝo de Ruĝa Kruco. Li kuraĝe skribis siajn vidpunktojn kaj agadis en la ombro malgraŭ sia mizero. La historio montras, ke lia penso influis tiun de miloj da disĉiploj. La vivo kaj la skriboj de Henry Dunant fariĝis firma fundamento, kiu donis direkton al la evoluo de Ruĝa Kruco, ekzakte kiel la vivo kaj verkaro de Ludoviko Zamenhof donis direkton al la agado de la esperantistaro.

La sukceso de Ruĝa Kruco estas unu el la fruktoj de la sindonema vivo de la ĝeneva klarvidanto. Malmultaj movadoj devis okupiĝi pri tiom da malfacile solveblaj disputoj. Kaj malgraŭ tio Ruĝa Kruco konservis, aŭ eĉ pligrandigis sian moralan povon.

Ĝia reputacio de objektiveco kaj sendependo ricevis la plej brilan certigon, kiam la ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj apelaciis al ĝi la 5-an de novembro de la lasta jaro por la kontrolo de la ŝipoj veturantaj al Kubo. Por la unua fojo la rolo de la Internacia Komitato de Ruĝa Kruco rekte kontribuis al malebligado de militeksplodo. Tiu alvoko de sinjoro Thant estis unu el la plej belaj omaĝoj al la centjara konstruiga laboro de unu el la privataj movadoj, kiuj plej vigle agadis por la bono de la homaro. La estonto montros, ĉu la

rolo de Ruĝa Kruco etendiĝos al malarmigo de batalontoj en aliaj cirkontancoj, ol en Kubo, kie, dank'al la saĝo de sinjoroj Ĥruĉov kaj Kenedy ĝi ne bezonis ekagi.

Ni prezentis al vi dum tiuj naŭ prelegoj kelkajn aspektojn de la prahistorio de Ruĝa Kruco. Dum la venontaj elsendoj mi forlasos tiun temon. Multaj geaŭdantoj skribis al mi mesaĝojn, al kiuj mi volas respondi. Kaj mi deziras direkti viajn rigardojn al aliaj konstruaj agadoj, por montri plian fojon al vi, ke kuraĝaj laboroj abundas en nia mondo. Kaj post kelkaj semajnoj ni revenos al nia Ruĝa Kruco por ekzameni kelkajn el ĝiaj kampanjoj. Jen riĉa programo. Se vi volas profiti pri ĝi, ne forgesu kapti la elsendojn de Radio-Svislando.

Ĝis reaŭdo diras al vi Claude Gacond.